

Reformo de la esperanto-instruado, 3a parto
Claude Gacond, 178-a radioprelego, 1967.03.08 & 1967.03.11

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni vidis kelkajn kaŭzojn al necesa reformo de la esperanto-instruado. Ni revenu al tiu aktuala temo.

A.- Dum la esperanta skiferio en Adelboden ni eksentis la neceson verki radikaron pri la skiado. En la diskutoj ni tiam rimarkis, ke unue estas necese akiri klaran komprenon pri la esperanta vortfarado.

Cl.- Ĉu la radiko **ski** signifas la **ilon-ski** aŭ la **agon-ski**. Tion ni devas koni kun certeco. Kaj la samon por ĉiu radiko.

A.- Unu vespero estis dediĉita al atenta studo de la esperanta vortfarado. Kaj la partoprenantoj malkovris, ke ekzistas kategorioj da radikoj. **Ski**, kun **bros** kaj **neĝ** estas nomaj aŭ substantivaj radikoj.

Cl.- Ili poste rimarkis, ke en esperanto radiko bezonas dufoje ricevi la markon de sia kategorio. Tio estas speco de lingva pleonasmio. Ne sufiĉas diri **ski**, **bros** aŭ **neĝ** por ricevi substantivojn, kvankam tiuj radikoj gramatike estas nomoj. Oni devas aldoni la markon de la nomo. **Skio, broso, neĝo**.

A.- Per derivado estas poste eble formi verbojn. Tiam nur la finaĵo estas verba, la radiko restas nomo : **skii, brosi, neĝas**.

Cl.- Se oni volas reveni al la noma formo, sed tiam por esprimi agon, tiam la sufikso **ad** anstataŭas la finaĵon **i**. **Skiado, brozado, neĝado**.

A.- **Skrib, glit, bala** estas radikoj apartenantaj al alia kategorio gramatika. Ili estas verbaj radikoj, kaj por fariĝi veraj verboj ili alvokas verban finaĵon : **skribu, gliti, mi balais**.

Cl.- Per derivado ili poste formas nomojn de ago : **skribo, glito, balao**. Se oni deziras havi la instrumenton, sufikso estas absolute necesa : **skribilo, glitilo, balailo**.

A.- La partoprenantoj al la skirestado konstatis, ke ne ekzistas paralelismo inter la radikoj **ski** kaj **skrib**. Al **skio** ne korespondas **skribo**, sed **skribilo**, kaj al **skiado** ne korespondas nomo kun sufikso, sed **skribo**. Al alia gramatika kategorio, aliaj reguloj.

Cl.- Nu, kiom da lernolibroj tion fakte instruas? Verŝajne tre malmultaj. Tamen por povi majstri la lingvon, tiam estas absolute necese koni tiujn regulojn pri vortfarado.

A.- Ni ne volas pli longe babili pri tiu temo. Ni nur volas menci, ke ankoraŭ ekzistas adjektivaj radikoj : **bon, grand, blank**, kiuj bezonas sufiksojn por formi verbojn konkretajn : **bonigi, grandiĝi, blankizi**. La senpera verbigo de tiuj adjektivoj kreas verbojn malfacile tradukeblajn en la eŭropajn lingvojn, pro tio la eŭropanoj preferas diri : la kuko gustas **bone**, anstataŭ la kuko **bonas**.

Cl.- Aliaj radikoj estas prepoziciaj aŭ adverbaj. Ili estas nudaj radikoj : **jes, ne, en, anstataŭ** : Per derivado ili ankaŭ formas plej diversaj vortojn : **jesi, nea, eno, anstataŭanto**. Nudiĝante, verbaj radikoj povas fariĝi prepozicioj : **far** mia amiko, **fin** la stato, **help** nia lingvo. Se la senpera verbigo de la adjektivoj estas nun fakto en nia lingvo, la senpera prepoziciigo de la verboj ŝajnas al la malnova generacio iom revolucia. Tamen ĝi sin trudas en la poezia kaj parola lingvoj !

A.- Por reveni al nia skirestado ni ekzamenu, kiel faras la esperantistoj, kiam ili deziras sin esprimi. Por diri **ski-deklivo**, **ski-kampo** la komencantoj pruntas el sia nacia lingvo ekzemple **pist** kaj diras **mi skiis kun plezuro sur tiu pisto**. Li rimarkas, ke lia diro vekas reagon.

Cl.- Rigardante en vortaro li malkovras, ke **pisto** neniel rilatas kun la skiado. **Pisti** signifas **pecetigi** aŭ **pulvorigi per ripetitaj batoj**. Li devas trovi alian radikon. Li do sin riskas : **mi ŝatas tiun piŝton**. Kaj li ricevas strangan respondon, kiu rimarkigas al li, ke **piŝto** troviĝas en aŭtomobila motoro.

A.- Tiam kio restas al nia komencanto. Uzi la afiksaron. Aŭdu lin: **Estas tro da skianto sur tiu skiadejo**.

Cl.- Oni lin komprenis. **Skiejo** signifus **la ĉambro, kie staras la skioj dum la nokto**.

A.- Tiu ĵonglado kun la esperanta vortfarado ne estas sufiĉe sisteme instruata en la elementaj lernolibroj. Tro ofte la aŭtoroj de tiuj lernolibroj kontentiĝis doni liston da vortoj. Por ĉiu vorto ili devus doni almenaŭ kvin signifojn, kaj en ekzercoj ili devus devigi la lernantojn retrovi tiujn signifojn.

Cl.- Anstataŭ trovi nur **skio** en la vorta listo, oni devus trovi : **skio**, **skii**, **skiado**, **skiadejo**, **skianto**.

A.- Anstataŭ trovi nur **gliti**, oni devus trovi **gliti**, **glito**, **glitilo**, **glitejo**, **glitŝuo**.

Cl.- Anstataŭ trovi nur **bona**, oni devus trovi **bona**, **bono**, **bonulo**, **malbona**, **bonega**.

A.- Anstataŭ trovi nur **en**, oni devus trovi **en**, **eno**, **ene**, **enigi**, unu fojo **en** tago.

Cl.- Estas tiuj ekzercoj, kiujn serĉas hodiaŭ la lernantoj, ĉar ili deziras kapabli flue paroli la lingvon. La turismo ebligas al ili partopreni kongresojn. Pro tio ili lernas plej ofte esperanton ne por legi la poemojn de Kalocsay, sed por paroli. Pro kio hodiaŭ la homoj lernas ekzemple la italan aŭ la hispanan. Ĉu por legi en la originalo la *Dian Komedion* kaj *Don Kiĥoto* ? Verŝajne ne. Ili deziras povi pli profiti de siaj vojaĝoj en tiuj mediteraneaj landoj.

A.- Tion tre bone scias la verkantoj de lernolibroj por la itala kaj la hispana.

Cl.- Kial por esperanto ne estus same. Eĉ idealistoj deziras povi praktiki la lingvon parole, ne nur lege. Ili devas trovi en la lernolibroj ne nur frazojn, kiuj pretigas al la legado, sed ĉefe modelojn por povi paroli kiel eble plej efike.

A.- La lernado de esperanto devas esti vera gimnastikado pri la esperanta vortfarado, pri la uzo de la akuzativo, pri la transitiveco kaj netransitiveco.

Cl.- Pri tiuj novaj lernolibroj ni parolos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-